

KATOLIKA SENTO

Periodico dell'Unione Esperantista Cattolica Italiana (UECI)

www.ueci.it

"Per la promozione della fratellanza e della comprensione tra i vari popoli di diverse lingue" (Paolo VI)

Periodico bimestrale - Reg. trib. di Vercelli 22.12.1997 n. 306 -
Sped. in abb.post. art. 2 comma 20/c L662/96 - filiale di Vercelli -
Direttore resp.: Mons. Gianni Ambrosio - Dir. e amm.: Vercelli, via Benadir, 62
tipografia edizioni **SAVIOLO** s.n.c. - Vercelli

Anno 91 - n. 4
LUGLIO - AGOSTO 2012

26.a UECI-KONGRESO

De la 25a ĝis la 29a de majo okazis la ĉijara UECI-kongreso en Albisola, provinco de Savona, ĉe la Sanktejo de la Paco.

La traktita temo de la kongreso estis, ĝuste, la Paco, laŭ du vidpunktoj: religia kaj kultura.

Dum la kongreso oni plenumis ĉiutagajn religiajn momentojn: Matenajn Laŭdojn, Sanktan Meson, Rozarion, kune preĝatan en la korto antaŭ la kapeleto de la Madono, kaj Vesperan Kompletorion.

Vendredon, jam fru-posttagmeze, ekis la alvenoj de partoprenantoj, 38 ĉeestantoj el la 46 aliĝintoj, kaj, vespere, en amikeca etoso, okazis la renkontiĝo de malnovaj gemikoj kaj la sperto de novaj konatiĝoj.

La sekvanta tago estis tute okupita per multenombraj prelegoj. Post la kongresa malfermo fare de la prezidanto Daminelli, frato Pierluigi Svaldi prezentis la unuan

raporton pri la religia temo: signifojn de malsamaj elektoj. "La Sinjoro donu al vi la taj eroj.

Pacon". Sekvis, unuafoje, elprovo pri Lectio Divina. Temas pri ia "Ronda Tablo", celanta stimuli ĉiujn ĉeestantojn interesiĝi kaj interveni pri diskutindaj temoj. La gvidanto, frato Pierluigi invitis ĉiun el ni elekti vorton aŭ frazon el la teksto de la Evangelio legota dum la posta Meso, kiu aparte tuŝis lin. Je la fino, li ekzamenis kaj klarigis la

En la posttagmezo daŭris la prelegoj. Filippo Zanoner prezentis: "Eduki al la Paco, eduki al la amo". Tuj poste Carlo Sarandrea, parolis pri la "Diversaj konceptoj de paco dum la tempo". Daŭrigis Norma Cescotti Covelli ilustrante, ankaŭ per lumbildoj, la aspekton kaj la decidajn vivomomentojn de Mahatma Gandhi, kies pensoj kaj aparta



Kongresejo

(fotis Marco Politi)

vivostilo igis lin iniciatinto de movado por paco kaj frateco inter la popoloj. Prezidanto Daminelli legis kaj komentis kelkajn verkojn de Zamenhof pri la paco, precipe tiujn pri “Homaranismo”, la memuaro “Gentoj kaj lingvo internacia” kaj “Post la Granda Milito: Alvokon al la Diplomatoj”.

Fine, por depreni la ĉeest-antaron de tiuj gravaj prikons-ideroj, Gianni Conti prezentis sian ŝerceman skeĉon: “El kiu proverbo vi estas?”, celante montri, ke ĉiu proverbo havas sian kontraŭon.

La sekvantan matenon, dimanĉon, okazis la jara kun-veno de UECI, kiu ĉijare en-tenis la elekton de la nova Centra Komitato.

Posttagmeze la grupo ek-veturis al Noli Ligure, urbeto lokita en rodo de la okcidenta Liguria marbordo. Antikva centro de Ligurianoj, ĝi fari-ĝis mezepoka bizanca bazo. Detruita de Longobardoj kaj tute rekonstruita de Frankoj, la urbeto etendiĝis al la apudaj vilaĝetoj kaj fariĝis, iom post iom, memstara mara Respu-bliko kun konsiderinda kaj efika floto. Ĝi subtenis elĉer-pajn batalojn kontraŭ invad-antaj popoloj, pirataj atakoj, malsatmizeroj kaj epidemioj ĝis kiam la armeoj de Napole-ono forprenis por ĉiam ĝian memstarecon.

La ekskurso pludaŭris ĝis vilaĝeto Finalborgo, origine posedaĵo de Markizolando regata de Sinjoroj Del Carret-



Kapeleto (fotis M.Politi)

to, kiuj riĉigis ĝin per palacoj, preĝejoj, kasteloj kaj eĉ monaĥejo kun pompaj klostroj. Enfermita en antikvaj muroj, ĝis nun bone plutenitaj, la vilaĝeto prezentas siajn mal-larĝajn stratetojn, la placojn, kie la ardezo ornamas pordegojn, kolonojn, monumentojn, la renesancajn kaj barokajn palacojn. El ĉi-tiuj evident-iĝas la baziliko de Sankta Biagio, luksega ekzemplo de baroka arkitekturo, kun la gotika sonorilturo, okangula, iom pendanta, kun biforoj. En la interno estas mirinda la grandiozeco kaj la riĉeco de la dekoracioj.

La sekvantan lundon, pro-fesoro Giordano Formizzi prezentis la lastan prelegon parolante pri “Pedagogio de la Paco”. Sekvis diskuto pri la temo.

Posttagmeze okazis la dua ekskurso al la grotoj de Toira-

no. En ĉi-antikva mezepoka vilaĝeto, dum la pasinta jar-cento, iuj loĝantoj, pasie interesiĝintaj pri speleologio, malkovris serion de salonoj interne de la jam konata groto Basura. Laŭ la preskaŭ duon-kilometra itinero oni povas admiri riĉecojn kaj variecojn de naturaj deponitaĵoj. El aparta intereso estas la atesto de tiea ĉeesto de la prahistoria homo, vivinta antaŭ 13.000 jaroj. Oni atribuas spurojn de piedoj, manoj, genuoj al la tiamaj ĉasistoj utiligantaj la grotojn por celebri ritarojn. Atestas tion la ĉeesto de argi-laj globetoj ĵetitaj kontraŭ la parietojn, verŝajne kun ritara signifo. La groto estis ankaŭ rifuĝejo, dum jarmiloj, de la prahistoriaj ursoj, kiuj tie pasigis la letargion. Estas tie multaj ostaj restaĵoj, spuroj de kruroj kaj ungoj sur la parietoj. En la jaro 1960 oni boris galerion en la kalkoŝto-na roko por estigi trairejon inter la unua groto (Basura) kun alia groto, tiu de Sankta Lucia, kie nun estas la elirejo.

Post la reveno la vespero finiĝis per la aŭskulto de kanzonoj de kantisto Manuel Rovere.

La sekvantan matenon la prezidanto deklaris fermita la kongreson, la nova Centra Komitato kuniĝis por la unua fojo, kaj ekis iom post iom la forveturoj, kun interŝanĝoj de manpremoj, salutoj, brakumoj en etoso de sincera amikeco.

Norma Cescotti

MILANO: SETTIMO INCONTRO MONDIALE DELLE FAMIGLIE

Il ricordo di quella domenica raccontato da chi c'era

di Giovanni Daminelli

Appena terminato il nostro congresso è iniziato a Milano il Settimo Incontro Mondiale delle Famiglie (30 maggio-3 giugno).

L'IKUE si era iscritta nelle lista delle associazioni cattoliche aderenti all'iniziativa. Il suo presidente, cioè io, ha partecipato alla Santa Messa celebrata dal Santo Padre nel campo volo di Bresso domenica 3 giugno.

L'aeroporto di Bresso confina con il comune in cui risiedo, Sesto San Giovanni. Nella mia parrocchia, già dal mese di dicembre si cominciò a parlare della cosa per organizzare l'accoglienza dei pellegrini. Una decina di famiglie si sono offerte per dare ospitalità, l'oratorio ha messo a disposizione la palestra da attrezzare a dormitorio e si sono raccolti nominativi di volontari.

Domenica mattina 3 giugno, è stato bloccato il traffico veicolare nelle vie adiacenti al campo di volo per un tratto di due chilometri, la diocesi ha sospeso la celebrazione delle Sante Messe per consentire la partecipazione anche dei sacerdoti e laici solitamente addetti al servizio liturgico. I volontari della mia parrocchia si sono disposti lungo i quattro chilometri di strada che collegano la stazione ferroviaria al campo volo per indirizzare i pellegrini che giungevano con il treno, altri volontari si sono posti alla stazione della metropolitana e alle fermate degli autobus.

La Messa del Papa sarebbe iniziata alle 10. Sono uscito di casa alle 7:15 e mi sono fatto a piedi i sei chilometri di strada fino a Bresso. Già dopo il primo mezzo chilometro ho incominciato a vedere qualche pellegrino

incamminato nella mia direzione. Man mano che procedevo vedevo aumentare il numero dei camminanti fino ad assumere le dimensioni di un lunghissimo corteo. Quando verso le 8:30 sono entrato nel campo volo, questo era ormai pieno a metà e



ho trovato posto a circa mezzo chilometro dall'altare. Quando verso le 9:30 è arrivato il Papa la moltitudine dei presenti era impressionante e si estendeva per un altro mezzo chilometro alle mie spalle. Gente di ogni nazione, lingua ed età con i loro striscioni e bandiere. Vicino a me c'era un bimbo spagnolo, di forse tre anni, che cercava di socializzare con tutti; sua madre lo teneva d'occhio, ma per maggior sicurezza gli aveva scritto il nome (JUAN) sul dorso della mano sinistra e il numero di telefonino ben visibile sul braccio destro. Qua e là qualche gruppo parrocchiale, nell'attesa, recitava il Rosario. Finalmente è arrivato il Papa. Ha percorso con la papamobile un lungo tratto tra la folla, ha abbracciato e baciato non so quanti bambini che gli veni-

vano porti, mentre il coro in distanza cantava. È seguita la Santa Messa solenne, con letture e preghiere in svariate lingue, lo storico discorso del Papa e l'annuncio che il prossimo Incontro Mondiale delle famiglie si terrà a Philadelphia nel 2015.

Non parlo del discorso del Papa e degli interventi dei vari cardinali presenti perché ne hanno ormai a lungo parlato i giornali, radio e televisioni.

La cosa che mi ha colpito è stata la perfetta organizzazione e il gioioso entusiasmo dei volontari presenti con la funzione di convogliare ordinatamente la folla nei vari settori e pronti ad intervenire ad ogni richiesta. Ognuno di noi ha ricevuto all'ingresso il libretto della messa; il campo volo è stato suddiviso in settori separati da corridoi transennati per garantire gli interventi di emergenza e rapide vie di fuga; sono state distribuite gratuitamente centinaia di migliaia di bottiglie di acqua minerale (per fortuna il cielo era nuvoloso); nei punti strategici erano collocate le forze dell'ordine, i mezzi di emergenza e punti di ristoro. Un elicottero ci sorvegliava dall'alto. Malgrado la vastità dell'area, l'acustica e la visione erano perfette grazie a numerose torri con maxischermo e decine di altoparlanti. Quando poco dopo mezzogiorno è tutto finito, molti si sono recati ai posti di ristoro predisposti attorno al campo, ma la maggior parte si è incamminata sulla via del ritorno. Sono rientrato a casa verso le 14:00 stanco ed affamato, ma con il cuore contento e orgoglioso di poter dire: "io c'ero".



MALFERMITAJ AL LA TUTA MONDO

Rubriko zorge de frato Pierluigi Svaldi

L'amore materno del Padre

«Fate il vostro gioco!». Come dire: «Ognuno faccia secondo le proprie possibilità e si comporti liberamente». Un discorso esclusivamente democratico che sottolinea l'autonomia di ognuno senza tener conto della vicinanza tra noi.

In una famiglia che si rispetti, oltre al codice: fraterno, «ognuno faccia quello che vuole», viene invocato continuamente il codice materno, cioè la preoccupazione della madre di tenere insieme i figli, invitandoli all'accoglienza reciproca, al perdono, alla solidarietà. Anche i figli considerati irriducibili trovano spazio nell'amore materno.

Nella fede cristiana ogni uomo viene considerato un 'fratello' in quanto 'figlio di Dio'. L'amore materno del Padre che è nei Cieli vuole raggiungere ogni uomo, ogni creatura, chiamando tutti, nessuno escluso, a formare un'unica famiglia. Il Dio che si fa uomo come noi si fa chiamare 'Figlio', diventando così la vera immagine di ciò che siamo chiamati a diventare. Per riuscire a condividere questo progetto di Dio ogni giorno siamo invitati a pregare, dicendo: «*Sia fatta la tua volontà*».

Per il fatto che spesso ci rivolgiamo a Dio nei momenti della prova e del bisogno, chiedere che si compia la sua volontà diventa rassegnazione forzata. E questo genera il detto: «Non cade foglia che Dio non voglia». Abituati a pensare a un Dio che fa quello che vuole, a immagine dei

La patrina amo de la Patro

«Faru vian ludon!». Kiel diri: «Ĉiu faru laŭ siaj eblecoj kaj libere konduitu». Absolute demokrata parolado, kiu substrekas ĉies aŭtonomion senkonsidere la najbarecon inter ni.

En respektinda familio, krom la frata kodo: «ĉiu faru tion, kion oni volas», senĉese estas alvokata la patrina kodo, tio estas la patrina klopodo kune teni la filojn, petante ilin akcepti sin reciproke, esti pardonemaj kaj solidaraj. Ankaŭ la filoj konsiderataj malcedemaj trovas sian lokon en la patrina amo.

En la kristana fido ĉiu homo estas konsiderata kiel 'frato' ĉar li estas 'filo de Dio'. La patrina amo de la Patro kiu estas en la ĉielo klopodas atingi ĉiun homon, ĉiun kreitaĵon, alvokante ĉiujn, senescepte, estigi ununuran familion. Dio, kiu fariĝas homo kiel ni, sin deklaras 'Filo', iĝante tiel vera bildo de tio, kio ni estas alvokataj fariĝi. Por sukcesi partopreni en tiu ĉi projekto de Dio, ĉiutage ni estas invitataj preĝi, dirante: «*Fariĝu via volo*».

Pro la fakto, ke ni ofte turnas nin al Dio en la momentoj de la elprovo kaj de bezono, peti la plenumigon de Lia volo, montriĝas trudita rezignacio. Kaj ĉi tio naskas la maksimumon: «Ne falas folio, se ne volas Dio». Por ni, al kutimiĝintaj al ideo pri Dio, kiu faras tion, kion Li volas,

‘padroni’ di questo mondo, il fare la sua volontà significa normalmente subire la necessità.

Nel Vangelo di Marco, al capitolo 4, troviamo che Dio viene paragonato a un seminatore che continuamente esce a seminare, senza guardare dove vada a finire il seme. Infatti «alcuni semi caddero sulla strada ...», «altri caddero su un terreno sassoso ...», «altri tra le spine», ma una certa quantità di seme «cadde in terra buona e portò frutto». Fa veramente buona impressione questo seminatore che esce a seminare senza nessuna parsimonia. Infatti Dio ama spargere semi di vita ovunque, sperando di raccogliere quanto basta dall’abbondanza della seminazione.

Come non gioire del bellissimo gesto del seminatore che con larghezza estrema dà a tutti, in ogni momento, germi di vita? Perché non ripetere fino allo spasimo: «*Sia fatta la tua volontà*», accettando con gioiosa serenità tutto quello che il «*Padre nostro*» ha pensato e concretizza per ciascuno di noi? Perché non fare di ogni evento già verificatosi un oggetto di desiderio, come se si fosse realizzata la cosa migliore?

Ecco quello che ci manca: arrivare un po’ alla volta a desiderare che quanto è avvenuto sia avvenuto; smettere di dire di sì a Dio e poi subito aggiungere: «Ma forse sarebbe stato meglio ...»; accettare anche l’imponderabile, non in seguito a qualche considerazione, ma solo perché Dio lo ha permesso. Infatti l’obbedienza a Dio nel corso degli eventi è di per sé un evento assoluto. Non viviamo casualmente, ma nella ‘casa’ che Dio ci ha preparato nel tempo, affinché rimanga forte in noi il desiderio della dimora eterna con Lui.

Per questo ripetiamo volentieri: «*Sia fatta la tua volontà*».

samkiel la ‘mastroj’ de ĉi tiu mondo, plenumi lian volon normale signifas submetiĝi je la neceso.

En la Evangelio laŭ Marko, 4.a ĉapitro, ni trovas, ke Dio estas komparata kun semanto, kiu senĉese eliras por semi, senzorgante, kien falas la semo. Fakte «*iuj semoj falis sur la vojon ...*», «*aliaj falis sur ŝtonozan terenon ...*», «*aliaj falis inter dornojn ...*», sed ia kvanto da semoj «*falis en la bonan teron kaj ĝi donis frukton*». Vere bone impresas tiu ĉi semanto, kiu eliras semi sen ia ŝparemo. Fakte Dio ŝatas disŝuti ĉien ajn vivo-semojn, esperante rikolti sufiĉe per la abundo de la semado.

Kiel ne ĝoji pri la belega gesto de la semanto, kiu tre malavare donas al ĉiuj, ĉiumomente, vivoburĝojn? Kial ne ripeti ĝisangore: «*Fariĝu via volo*», ĝoje kaj trankvile akceptante ĉion, kion «*nia Patro*» elpensis kaj konkretigas por ĉiu el ni? Kial ne fari el ĉiu jam okazinta evento dezircelon, kvazaŭ realiĝis la plej bona afero?

Jen tio kio mankas al ni: iom post iom eĉ aŭdaci deziri, ke tio, kio okazis, okazis; ĉesi jesi al Dio kaj poste tuj aldoni: «*Sed eble estus pli bone ...*»; akcepti eĉ la neantaŭvideblaĵon, ne pro ia konsidero, sed nur ĉar Dio permesis ĝin. Fakte, la obeo al Dio en la fluo de la eventoj estas, ĝi mem, absoluta evento. Ni ne vivas hazarde, sed en la ‘domo’, kiun Dio preparis al ni en la tempo, por ke forte restu en ni la deziro je la eterna loĝado ĉe Li.

Pro tio ĉi ni ripetis volonte: «*Fariĝu via volo*».

Dirite inter ni ...



Konversacioj zorge de † Glauco Corrado

017

EKSKURSO

- Karlo, ĉu estas preta via dorsosako?
- Nun mi pretigos ĝin.
- De hieraŭ vi sciis ke vi devas ĝin prepari.
- Jes, panjo, sed mi ne havis tempon por tio.
- Kial?
- Ĉar mi devis prepari la lecionon pri matematiko.
- Ha, vi pravas: postmorgaŭ vi havos pride-mandadon.
- Jes, sed nun mi estas trankvila: mi alfrontos ĝin sentime.
- Nu, mi helpos vin pretigi la dorso-sakon.
- Bonege! De kio ni komencu?
- Mi dirus, ke ni povus komenci de la vestaĵoj.
- Sed estas nur unutaga ekskurso.
- Ne gravas: via patro diras, ke oni devas ĉiam esti pretaj.
- Jes, li diras, ke prefere oni portu pli grandan pezon, sed, ke oni devas kapabli alfronti ĉian situacion.
- Kaj li pravas.
- Sed estos suna tago.
- Ne gravas. La montaro estas surprizo-rica.
- Nu, vi enŝovu en vian dorso-sakon ĉi tiujn ŝtrumpojn el lana.
- Farite.
- Jen via kalsono.
- Mi enmetis ĝin en la sakon.
- Nun estas la vico de via linmaŝo.

UNA GITA

- Carlo, è pronto il tuo zaino?
- Ora lo preparo.
- Sapevi da ieri che dovevi prepararlo.
- Sì, mamma, ma non ne ho avuto il tempo.
- Perché?
- Perché ho dovuto preparare la lezione di matematica.
- Ah, hai ragione: dopodomani avrai un'interrogazione.
- Sì, ma ora sono tranquillo: la affronterò senza paura.
- Bene, ti aiuterò a preparare lo zaino.
- Evviva! Da cosa cominciamo?
- Direi che possiamo cominciare dal vestiario.
- Ma è una gita di un solo giorno.
- Non ha importanza: tuo padre dice che si deve essere sempre pronti.
- Sì, dice di portare piuttosto un peso maggiore, ma che si deve essere sempre in grado di affrontare ogni situazione.
- Ed ha ragione.
- Ma sarà un giorno di sole.
- Non ha importanza. La montagna è ricca di sorprese.
- Ebbene, infila nel tuo zaino queste calze di lana.
- Fatto.
- Ecco le tue mutande.
- Le ho messe nello zaino.
- Ora è la volta della tua maglietta.

-
- Kaj la mallonga pantalone?
 - Jen ĝi.
 - Dankon.
 - Sed jen ankaŭ la velura normala pantalone.
 - Tiun vi neniam forgesas.
 - Certe, ĉar se malvarmas tro multe ĝi bone ŝirmas vin.
 - Ĉu ion por la pluvo?
 - Tion mi ne volas forgesi.
 - Pri tio mi ne dubas.
 - Sed vi certe ne donos al mi pluv-ombrelon.
 - Stultulo.
 - Nu, pluv-ŝirmilo ne taŭgas, sed certe taŭgas tiu pluv-manteleto, kiun mi povas utiligi ankaŭ por kovri la dorso-sakon.
 - Jen la saĝulo.
 - Kio mankas?
 - Jakon vento-ŝirman vi kunportos.
 - Jes, mankas nur dika pulovero.
 - Kiu estas ĉi tie.
 - Mi plenigis duonon el la dorso-sako.
 - Restas ja multe da spaco por la aliaj aferoj.
 - Jes, ankaŭ la poŝoj estas utiligeblaj.
 - Tiujn utiligu por malgrandaj objektoj, kiujn vi bezonas rapide atingi.
 - Je viaj ordonoj.
 - Koncerne la poŝojn: komencu meti viajn dokumentojn en la supran poŝon.
 - Jes, mi metos ilin kun la mapoj.
 - Sed dividi la dokumentojn disde la mapoj.
 - Vi pravas, la mapojn mi konsultas nur prepare al ekmarŝo aŭ dummarŝe, sed la dokumentoj povus esti necesaj en kiu ajn momento.
 - Mi ĝojas, ke vi aŭskultas viajn gepatrojn:
 - Ed i pantaloni corti?
 - Eccoli.
 - Grazie.
 - Ma ecco anche i normali pantaloni di velluto.
 - Quelli non li dimentichi mai.
 - Certo, perché se fa troppo freddo, essi ti proteggono bene.
 - Qualcosa per la pioggia?
 - Non lo voglio dimenticare.
 - Su ciò non ho dubbi.
 - Ma non mi darai certamente un ombrello da pioggia.
 - Scemo.
 - Già, il parapigioggia non è adatto, ma è certamente adatta quella mantellina che posso utilizzare per coprire lo zaino.
 - Ecco il saggio.
 - Cosa manca?
 - La giacca a vento la porterai con te.
 - Sì, manca solo un maglione pesante.
 - Che è qui.
 - Ho riempito metà dello zaino.
 - Ma rimane certamente molto spazio per le altre cose.
 - Sì, sono utilizzabili anche le tasche.
 - Quelle utilizzale per le cose piccole che devi avere rapidamente a portata di mano.
 - Ai tuoi ordini.
 - A proposito delle tasche: comincia a mettere i tuoi documenti nella tasca di sopra.
 - Sì, li metto con le carte topografiche.
 - Sì, ma dividi i documenti dalle mappe.
 - Hai ragione, le carte le consulto solamente in preparazione di una camminata o durante una camminata, ma i documenti potrebbero essere necessari in qualsiasi momento.
 - Sono contenta che ascolti i tuoi genitori: ti

- | | |
|---|--|
| ili povas proponi al vi tiun sperton, kiun vi ne havas pro via juna aĝo. | possono offrire quell'esperienza che tu non hai per la tua giovane età. |
| – Bone, mi enmetis la dokumentojn. Kaj nun? | – Bene, ho messo i documenti. E adesso? |
| – Nun ni pensu pri la manĝaĵoj. | – Adesso pensiamo al vettovagliamento. |
| – Ne troplenigu mian sakon. | – Non riempire troppo il mio zaino. |
| – Estas pli bone por vi havi pli multe da manĝaĵo ol vi bezonas. | – È meglio per te avere più cibo di quanto hai bisogno. |
| – Kial? | – Perché? |
| – Vi povus resti pli longe sur la montaro pro subita vetero-ŝanĝiĝo. | – Potresti rimanere più a lungo sui monti per un improvviso cambio del tempo. |
| – La tago estas tro bela. | – La giornata è troppo bella. |
| – Vi povus renkonti iun, kiu restis sen manĝo. | – Potresti incontrare qualcuno rimasto senza cibo. |
| – Ne eblas. | – Non è possibile. |
| – Iu el viaj amikoj aŭ amikinoj povus bezoni ion. | – Qualcuno dei tuoi amici e delle tue amiche potrebbe aver bisogno di qualcosa. |
| – Tio povus okazi. | – Questo potrebbe succedere. |
| – Nu, mi konvinkis vin. Nun ni komencu. | – Finalmente, ti ho convinto. Cominciamo. |
| – Jes, donu al mi ĉokoladon, ĉar tiu donas al mi energion. | – Sì, dammi della cioccolata, perché quella mi dà energia. |
| – Metu ĝin en taŭgan lokon, malapude de la dorso kaj de la sunradioj. | – Mettila in un luogo adatto, lontano dalla schiena e dai raggi del sole. |
| – Ĉu vi havas ankaŭ karamelojn? | – Hai anche delle caramelle? |
| – Jes, tiujn mi havas laŭvole. | – Sì, ne ho a volontà. |
| – Ilin donu al mi, tre multajn. | – Dammene, moltissime. |
| – Kial? | – Perché? |
| – Ĉar mi deziras disdoni ilin al la tuta grupo dum la marŝo. Ĝenerale oni forgesas ilin kunporti. | – Perché desidero distribuirle a tutto il gruppo durante il cammino. Di solito si dimentica di prenderle con sé. |
| – Jen ĉi tie du karamelujoj. | – Ecco qui due pacchi di caramelle. |
| – Nun mi bezonas ion por trinki. | – Adesso ho bisogno di qualcosa da bere. |
| – Estas teo kaj aliaj du trinkaĵoj. | – C'è del thé ed altre due bibite. |
| – Ĉu estas la akvujo? | – C'è la borraccia? |
| – Jes, vi povos ĝin plenigi per freŝa akvo, kiam vi estos sur la montoj. | – Sì, potrai riempirla di acqua fresca quando sarai sui monti. |
| – Nu, ŝajnas, ke por trinki mi havas sufiĉe multe. | – Beh, sembra che abbia abbastanza da bere. |

- Jen la pano.
- Kiom da pecoj?
- Mi donos al vi ses pecojn.
- Tio estas pli ol sufiĉa.
- Kompreneble, vi devos kunpreni ankaŭ vian tranĉilon.
- Kompreneble, ĝi estas en la kutima loko.
- Bone, dum mi ĝin prenas, bonvolu elekti la salumojn.
- Certe.
- Jen via tranĉilo.
- Pri salumoj, mi elektis salamon, kiun tre multe mi ŝatas.
- Nur salamon?
- Ne, ankaŭ ŝinkon.
- Vi pravas, ŝinko bone taŭgas por prepari sandviĉojn.
- Kion vi dirus pri fromaĝo?
- Sed ĝi devas esti ne tro mola, por ĝin transporti pli komforte kaj por pli bone ĝin tratanĉi.
- Mankas nur kelkaj viando-skatoletoj.
- Kaj du pomoj.
- Jes, mi prenos du skatoletojn da viando kaj la du pomojn.
- Tio sufiĉas.
- Jes, ĉar la dorso-sako estas jam peza, kaj mi ne volas tro streĉi mian dorson.
- Bone, ŝajnas, ke nun ĉio estas efektive en ordo.
- Ha, ni forgesis la medikamentojn.
- Tiujn oni ne devas forgesi.
- Kaj oni ne devas forgesi iom da papero pluruza.
- Jes, nun ĉio estas en ordo.
- Jen, farite!
- Ecco il pane.
- Quanti pezzi?
- Te ne darò sei pezzi.
- È più che sufficiente.
- Naturalmente dovrai prendere anche il tuo coltello.
- Naturalmente, è al solito posto.
- Bene, mentre lo prendo, prendi, per piacere, i salumi.
- Certamente.
- Ecco il tuo coltello.
- Riguardo ai salumi, ho scelto il salame, che mi piace moltissimo.
- Solamente il salame?
- No, anche del prosciutto.
- Hai ragione, il prosciutto è ben adatto per preparare panini imbottiti.
- Cosa diresti del formaggio?
- Ma non deve essere troppo molle per trasportarlo più agevolmente e per tagliarlo meglio.
- Mancano solamente alcune scatolette di carne.
- E due mele.
- Sì, prenderò le due scatolette di carne e le due mele.
- È abbastanza.
- Sì, perché lo zaino è già pesante e non voglio forzare troppo la mia schiena.
- Bene, sembra che ora tutto sia effettivamente a posto.
- Ah, abbiamo dimenticato i medicinali.
- Quelli non si devono dimenticare.
- E non si deve dimenticare un po' di carta per usi diversi.
- Sì, ora tutto è a posto.
- Ecco, fatto!

Nia eta Parnaso

Rubrica dedicata alla Poesia

Rubriko dediĉita al Poezio

ESTATE IN SICILIA

SOMERO EN SICILIO

*Immobile è il tempo
nella canicola
del borgo arroccato
su un mare di sole.*

*Lento scorre
il rosario dei giorni
e le notti lunari
ripetono
canti d'amore...
Giovani abbandoni.*

*Ancora un'estate
dai lunghi meriggi
distesi
sui ciottoli bianchi.*

*Errando,
al calare del sole,
sulla battigia solitaria,
il silenzio rosato
mi arresta
e mi affonda nell'eterno.*

*Senmova estas la tempo
dum hundaj tagoj
en la vilaĝeto ŝirmita
super maro de suno.*

*Malrapide fluas
la ĉeneroj da tagoj
kaj la lunnoktoj
ripetas
amkantojn...
junajn sinfordonojn.*

*Ankoraŭ somero
je longaj tagmezoj
sternitaj
sur la blankaj ŝtonetoj*

*Vagante,
ĉe la sunsubiro
laŭ la soleca ondozono,
la roza silento
min haltigas
kaj dronigas en la eternecon.*



Anna Amorelli Gennaro

(esperantigis Norma Cescotti)

26.a UECI-kongreso

EDUKI AL LA PACO. EDUKI AL LA AMO

prelego de Filippo Zanoner

Paco kaj amo: du vortoj kiuj, kompreneble, ne kontrastas inter si; eĉ mi dirus ke ili povas esti samsignifaj, se per "amo" ni aludas ne pri vaga bonkoreca sento, pri nekontrolebla sentimento, sed pri la fundamenta principo kiu devas reguligi la homajn rilatojn, principo laŭ kiu oni devas voli kaj fari tion, kio estas bono, por la aliaj kiel por si mem.

Kiam Jesuo estis pridemandita pri la ĉefa Dia ordono, Li, citante la Sanktan Skribon (*Readmono*, 6,5), respondis: "Amu la Eternulon, vian Dion, per via tuta koro kaj per via tuta animo kaj per via tuta menso"; sed tuj poste aldiris: "Kaj dua estas simila al la unua: amu vian proksimulon kiel vin mem" (*Mat* 22, 34-40).

Amu vian proksimulon. Kiu estas mia proksimulo? Jesuo respondis per la fama parabolo pri la bona Samariano. Ni povus respondi, se ni bone komprenis la signifon de tiu evangelia rakonto: "ĉiu homo". Samariano, kiel konate, ne estis samreligiano nek apartenis al la juda popolo: li estis nur malŝatata fremdulo. Do Jesuo, intencis evidenti la universalecon de tiu ordono, senrilate kun religio.

Amo estas la unua devo de homo. Ĝi naskas kaj resumas ĉian alian devon. "Tio estas la leĝo kaj la profetoj", klarigas Jesuo mem.

Tion ripetas la Papo, ekleziuloj, religiuloj. Kia respondo? "Pastraj babiladoj", "tio koncernas nur religion, ne

realan vivon".

Kompreneble. Ĉu vi iam aŭdis ŝtatestrojn, ministrojn, urbestrojn paroli pri "amo"?

Estas vere ke ne ĉiuj povas konsenti pri la ordono ami Dion, ne nur ĉar estas multego da nekredantoj, sed, precipe, ĉar ĝenerale la homaro ne posedas ununuran ideon pri Dio.

Sed pri la dua ordono (kiel ĝin nomas Jesuo) ĉiuj devus konsenti. Kaj ŝajnas al mi ege strange, ke nur malofte kaj tute incidente oni deklaras tion. Male ĝi devus esti, se tiel diri, la unua artikolo de la ŝtataj konstitucioj, de ĉia leĝaro kaj regularo.

Ĉi tiu fundamenta devo, miaopinie, ne estas sufiĉe priatentata, precipe en la kampoj de edukado, socia vivo kaj justeco. Male, ni devus konstante memori ĝin kaj deklari ĝin malkaŝe kaj eksplicite.

Ĉi tiu devo, cetere, respondas al profunda postulo de la homa konscienco, kaj, kvankam kelkfoje ĝi postulas rezignojn kaj eĉ heroismon, kutime ne superas niajn fortojn: ĝenerale ĝi konsistas simple el plifaciligo, pliagrabligo de alies vivo; kaj tion oni plejofte faras spontanee, volonte. Ni spertas ankaŭ, ke ama ago, al kiu ajn direktita, ĉiam estas por ni mem fonto de kontento kaj ĝojo, kaj ke al malgranda signo de zorgemo ofte sekvas neimagebla bono.

El la fundamenta devo fontas la specifaj devoj nutri, vesti, helpi kaj protekti. La

t.n. "mizerikordaj faroj" ne estas libervolaj esprimoj de bonkoreco, sed veraj devoj, kaj al ili respondas veraj rajtoj de la bezonuloj.

Specifa devo estas ankaŭ edukado.

Eduki: etimologie "elkonduki", "elirigi", "suprenkonduki". Kiucele? Cele al korekta, plena disvolviĝo de la edukato. La verbo "eduki" havas en si mem pozitivan signifon. Ni italoj, samkiel aliaj popoloj, diras "bone edukita", aŭ simple "edukita" personon kiu bone kondutas, ĝentila, respektama. Tiel ke "maledukato" estas ĉe ni sinonimo de malĝentila, malrespektama.

Ofte mi pensas ke eĉ al Hitler oni instruis: "salutu, petu permeson, danku, pardonpetu".

Do, fakte, edukado havas pozitivan signifon kondiĉe ke ĝi celu substancan, ne nur formalan bonon.

Ĉiuj, ne necese la pliaĝuloj, rajtas, kaj kelkfoje devas, komuniki sian konon kaj sperton, sed edukado estas precipa tasko de gepatroj kaj instruistoj, tasko ne facila, plenumenda kun atento al la kvalitoj, kapabloj, aspiroj de la edukato, kaj cele al la transdono de spiritaĵoj.

Ĝuste pri ili aludis la Papo en sia ĉi-jara mesaĝo pri la edukado de junularo, indikante, kiel temojn kaj celojn de la eduka agado, veron kaj liberon, justecon kaj pacon: ja ne povas esti paco sen justeco, nek justeco sen libero kaj

respekto de vero. Kaj edukado al paco montriĝas necesa en la nuntempa socio, kiu ĝenerale konsideras normale kaj neeviteble, ke rimedoj por solvi konfliktojn estas milito kaj perforto.

Paco. Kio estas paco? La etimologio de ĉi tiu vorto estas malsama ĉe la diversaj lingvoj.

La latina vorto *pax* havas la saman radikon de *pactum*: akordo, interkonsento. En aliaj lingvoj ĝia signifo ligiĝas al kvieto, libero, amikeco, ĝojo. Ĉiukaze ĝi signifas ion pozitivan: ne simple malĉeeston de milito aŭ malamo.

Ĉiuj konsentas ke paco estas situacio kiu permesas libere agadi, evoluigi ideojn, iniciatojn, entreprenojn. Kaj, ĉar ĉiu homa agado efektiviĝas en rilato kun aliaj, paco signifas reciprokajn respekton, komprenon, helpemon kaj solidarecon.

Ĉio ĉi resumeblas en unu vorton: amo. Tial amo konturiĝas kiel fundamento kaj samtempe objekto kaj celo de edukado, samkiel de ĉia alia devo, de ĉia alia agado, de ĉia alia bono.

Ĉi tiuj konceptoj pri amo kaj edukado rilatas ne nur al unuopuloj, sed ankaŭ al organizoj, privataj kaj publikaj. Sekve, komunumo, provinco, ŝtata ministerio, juĝisto, policano devus "ami" siajn "subulojn". kaj, kiel aŭtoritatoj, plenumi edukan agadon.

Bedaŭrinde niaj politikistoj kaj administrantoj ne donas al ni edifan ekzemplon. Tute alie. Ŝajne regas la kontraŭa principo, egoismo, individua profito. Kaj ni sentas nin senpovaj kontraŭ la evidentaj maljustaĵoj kiujn ni ĉiuj konas

kaj amaskomunikiloj prezentas al ni ĉiutage. Ni, tamen, scias ke, bonŝance, en nia socio estas ankaŭ multe da bono, kaj ke bono ne faras bruon. Ni, do, ne timigitaj daŭrigu nian agadon cele al komuna bono kaj kontraŭ ĉia maljustaĵo.

Denove pri edukado: kiel la gepatroj ne rajtas limigi sin al nura puno de siaj idoj pro malobeoj, sed havas la devon eduki ilin (ankaŭ per punkorekto, se necesas), la ŝtato ne rajtas limigi sin al puno de krimuloj, sed ĝi havas la devon kiom eble eduki ilin kaj protekti la civitanojn kontraŭ krimaj agoj.

Nuntempe la eduka kaj protekta ŝtata sistemo, ne tro zorgema pri la invadaj instigoj al malbonfaro kaj perforto, limiĝas al la puno de kelkaj difinitaj kondutoj, puno kiu, tamen, povas aplikiĝi nur post longa procedo plenplena de formalajtoj.

Do, nun mi devas iomete paroli pri justico. Ni imagu familion en kiu ne ekzistas ia eduka metodo, sed nur estas antaŭviditaj punoj pro malobeo al iuj ordonoj.

Ni imagu ke en la dirita familio la puno estu fiksita nur du, tri, kvin, dek jarojn post la malobeo. Imagu la procedon: unu familiano rolas kiel akuzanto kaj alia familiano havas la taskon pruvi ke la malobeinto, eĉ se ties kulpo estas evidenta, ne povas esti kondamnita ĉar tute senkulpa. Ni imagu, fine, ke tia sistemo, celanta bonordon en la familio, kostu grandan parton de la familia enspezo. Tiel vi havas imagon pri tio kio okazas en la kampo de justico en Italio kaj en la mondo.

Kaj mi ne parolu pri la ho-

ma kaj jura etanimeco kaj pri vera barbareco, kiu regas en multegaj ŝtatoj, inkluzive de tiuj, kiuj pozas kiel defendantoj de demokratio kaj de homaj rajtoj.

Certe, danĝera krimulo devas esti arestita. Tio estas plenumo de nepra devo, la devo protekti, kiu apartenas al la devoj de aŭtoritato; kaj aŭtoritato devas ankaŭ kompreni la kialon de la krimo kaj klopodi trovi taŭgan rimedon por eviti ke ĝi ripetiĝu. Sed kia aŭtoritato povus fari tion? Certe ne la juĝistoj, la "doktoroj pri leĝo", kiuj per mezurilo dozas la aljuĝendan punon, des malpli la t.n. "popolaj juĝantoj": male, saĝaj spertuloj pri psikologio kaj sociologio. La juĝistoj devus nur zorgi pri la korekta konduto de la enketantoj. Samtempe, plejeble rapide, la vero devus esti certigita. Ĉu eblas ke la esploroj, malgraŭ la moderna aparataro nuntempe utiligebla, daŭras dekojn da jaroj, ofte senrezulte? Ĉu eblas ke nur fikciaj detektivoj kapablas rapide malkovri la veron pri krimo?

Kaj senrilate al la plena certigo de vero, la implikitoj en krima ago devus esti objekto de atento kaj reedukado, se ili evidente bezonas tion. Malsanulon oni devas ĉiam klopodi resanigi, eĉ se la malsano ne estas pruvita per dokumentoj.

Kompreneble, ĉi tie mi aludas pri gravaj, atentaltiraj krimoj.

Ni pensu pri la multenombraj juĝaj aferoj, pri kiuj okupiĝis televido kaj gazetaro en la lastaj jaroj. Ni ne povas ne konscii pri la absurdeco de la jura sistemo, kaj, aldone al tio, malaprobi tion, ke homaj dramoj aliformiĝas en spektakla-

klon kaj temon de salonaj babladoj.

La juĝa sistemo ne faris rimarkindan progreson de kiam, en 1764, Cesare Beccaria publikigis la faman traktaton "Pri krimoj kaj punoj", elirigante el mezepoka barbareco la tiutempan senton. Kaj surprizas min la nesentebloco de juristoj kaj leĝfarantoj, ilia nekapablo trafi la fundamentan principon, kiu devas reguli ankaŭ justicon.

La juĝa sistemo similas al malnova maŝino, kies funkciado (se tiel diri) estas ege multekosta, kaj necesas anstataŭigi ĝin per nova kaj bone funkcia aparato; aŭ al ka-

duka domo tute disfalgenda, por doni lokon al nova kaj diversa konstruaĵo. "Se via justeco ne superos la justecon de la Skribistoj kaj Fariseoj, vi tute ne eniros en la Regnon de la Ĉielo" (Mt 5,20). Do, nia justeco estu konkreta, trafa, ne supraĵa, ne formala. Senutilaj kaj eĉ damaĝaj estas la tribunaloj, se ilia funkcio limiĝas al juĝo kaj kondamno de la homoj taksitaj kulpaj. Se Jesuo diris "ne juĝu, ne kondamnu" (Luk 6,37), estas motivo! Kaj ni ne miskomprenu: ĉi tiu ordono tute ne kontraŭstaras la devon esti kritikaj – eĉ forte kritikaj – kaj ĉiam serĉadi la veron.

Konklude. Unua, fundamenta devo estas ami: voli kaj fari tion, kio estas bono por la aliaj kiel por si mem. Ni kreu firme pri ĉi tiu principo, ĝin malkaŝe deklaru kaj transdonu al la junuloj ekde la frua infanaĝo. Tiel ili, iom post iom, konscios pri siaj devoj kaj rajtoj, kaj, iĝinte plenkreskaj, komprenos la veran sencon de libero, respektos veron, praktikos justecon, starigos amikecajn kaj solidarecajn rilatojn, ankaŭ je internacia nivelo, agente kiel unuopuloj aŭ kiel apartenantoj al publikaj organizoj.

Nur sur fundamento de amo estos daŭra interhoma kaj interpopola paco.

NORME E QUOTE ASSOCIATIVE PER L'ANNO 2012

Associato ordinario <i>con Katolika Sento</i> (SO)	21,00 €
Associato giovane <i>con Katolika Sento</i> (SG)	10,50 €
Associato familiare <i>senza Katolika Sento</i> (SF)	10,50 €
Associato ordinario <i>con Espero Katolika</i> (SOE)	42,00 €
Associato sostenitore <i>senza Katolika Sento</i> (SS)	42,00 €
Associato sostenitore <i>con Espero Katolika</i> (SSE)	84,00 €
Solo abbonamento a <i>Katolika Sento</i> (AK)	10,00 €
Solo abbonamento a <i>Espero Katolika</i> (AE)	21,00 €

È associato giovane chi non ha superato i 25 anni. È associato familiare chi convive con altro associato. Specificare nella causale del versamento la categoria dell'associato, l'anno di nascita dei giovani, l'esatto indirizzo per il recapito del periodico K.S., la destinazione di eventuali offerte.

I versamenti vanno fatti sul C.C. Postale n. 47127675 *Unione Esperantista Cattolica Italiana U.E.C.I.*
codice IBAN: IT66 R076 0101 6000 0004 7127 675 Codice BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

NUOVO COMITATO CENTRALE U.E.C.I.

Presidente: Giovanni DAMINELLI, via Lombardia 37, 20099 Sesto S. Giovanni (MI) – tel. 02.2621149 – katolika.sento@ueci.it (la residenza del presidente è anche sede dell'associazione)

Vice presidente: fra Pierluigi SVALDI, Belvedere San Francesco 1, 38122 Trento – tel. 0461.230392

Segretario/cassiere: Marco POLITI, Via Montemartini 4, 20139 Milano – tel. 02.5395237

Consulente culturale-religioso: Ida BOSSI, Viale Faenza, 26/7 20142 Milano

Responsabile dei congressi: Giovanni CONTI, via F.Filzi 51, 20032 Cormanò (MI) – tel. 02.66301958

Responsabile culturale: Norma COVELLI CESCOTTI, via E.Fermi 29, 38100 Trento – tel. 0461.925210

Consulente informatico: Tiziana FOSSATI, via F.Filzi 30/A, 20035 Lissone (MB) - tel. 039.464942

Consulente editoriale: Carlo SARANDREA, Via di Porta Fabbrica 15, 00165 Roma – tel. 06.39638129

Assistente Ecclesiastico: mons. Giovanni BALCONI, p.zza Duomo, 16, 20122 Milano

Nota bene: Tutte le comunicazioni alla redazione di *Katolika Sento* vanno spedite al presidente UECI.

NI FUNEBRAS KAJ KONDOLENCAS

Ricordiamo nelle nostre preghiere di suffragio, due dei nostri che sono venuti a mancare in questi ultimi mesi. Il Signore li accolga tra i suoi santi.

Nicola LASALANDRA di Triggiano (Bari) è deceduto il 31 maggio 2012. Maestro elementare, impegnato nel sociale e in politica (fu segretario della sezione della Democrazia Cristiana del suo paese) è stato per diversi anni membro dell'UECI. Attivo nel movimento esperantista sia a livello locale, sia nazionale e anche internazionale, nel 1963 fu cofondatore del Gruppo "La Karavelo" di Bari. Era membro dell'Istituto Italiano di Esperanto e si è dedicato all'insegnamento della lingua impegnandosi a tenere corsi anche in località disagiate. Nell'ultimo periodo una malattia agli occhi ed un infarto lo avevano costretto a limitare i suoi impegni, ma non il suo entusiasmo.

Il diacono **János KIRSCH** è deceduto il 22 maggio a Szekszárd (Ungheria) all'età di 51 anni. Lascia la moglie Ágota con cinque figli in età scolare (Janos Mark, Katalin Zsófia, Marton Aron, Peter Kristof, Veronica Ágota). Fu consacrato nel 1996 e fu il primo diacono sposato della sua diocesi. Chi di noi ha partecipato a qualche congresso IKUE ha conosciuto certamente lui e la sua famiglia e ne ha apprezzato le doti spirituali ed umane. Il funerale è avvenuto il 25 maggio nella sua chiesa di Szekszárd con la presenza di due vescovi, una quarantina di sacerdoti e una decina di diaconi. In rappresentanza dell'IKUE c'era la vicepresidente Marija Belošević. Don Attila Szép, dell'IKUE, ha tenuto un breve discorso di saluto in Esperanto data la presenza di esperantisti venuti anche dall'estero. La partecipazione è stata numerosissima tanto che nel trasporto della salma a piedi verso il camposanto si è dovuto bloccare il traffico. Presso la tomba è intervenuto anche il sindaco con un breve discorso.



SINJORO

Sinjoro,
Vi kreas el nenio nian koron,
Vi puŝas ĝin al deziro de amo.
Pro tio ni estas kreitaĵoj de paco.

Vi portas krucon
de nia spirito kaj karno.
Sur brakoj de polvo Vi mortas.
Brakoj de niaj silentoj.

Karlo Odisio

Assemblea generale UECI 2012 Elezione del nuovo Comitato Centrale

Nel corso dell'assemblea annuale UECI di domenica 27 maggio è stato eletto il nuovo Comitato Centrale che rimarrà in carica fino al 2015. Ecco i risultati:

Aventi diritto al voto 117. Votanti 44 di cui 17 per lettera e 2 per delega. Schede valide 42, schede bianche 1, schede nulle 1.

Hanno ottenuto voti:

Giovanni Conti	37
Giovanni Daminelli	34
Norma Covelli	32
Fra Pierluigi Svaldi	32
Carlo Sarandrea	30
Tiziana Fossati	26
Marco Politi	18

Ida Bossi	13
Gabriella Zanni	12
Felice Sorosina	11
Giovanni Gazzola	8

Risultano quindi eletti i primi otto: Conti, Daminelli, Covelli, Svaldi, Sarandrea, Fossati, Politi, Bossi. Prima dei non eletti Zanni. Nel corso della prima riunione del nuovo CC, tenutasi nella serata di martedì 29 maggio, sono stati distribuiti gli incarichi come elencati a pag.13.

Nel corso dell'assemblea generale sono stati approvate all'unanimità le relazioni morale e finanziaria. È sorto un dibattito nella discussione

del bilancio preventivo che risultava in deficit a causa dell'incremento dei costi di spedizione di Katolika Sento; si è quindi deciso di aumentare la quota di iscrizione all'UECI per il 2013 di 1 euro. Quindi la quota passerà da 21 a 22 euro. Pur essendo consapevoli che il piccolo incremento può non essere sufficiente a portare il bilancio in pareggio, si è voluto contenere l'aumento data la difficile situazione economica attuale. Non è vietato contribuire con una cifra superiore: ci affidiamo alla generosità degli associati.

Novità dalla Radio Vaticana: meno radio, più web



Dal 1° luglio la Radio Vaticana termina le trasmissioni in onda media ed onda corta verso l'Europa e l'America. Rimangono le trasmissioni via radio verso l'Africa, l'Asia e il Medio Oriente. Dice padre Federico Lombardi, direttore della Radio Vaticana: "Dopo aver celebrato lo scorso anno il suo 80° anni-

versario, la Radio Vaticana è pronta per affrontare una nuova tappa della sua storia affidando in modo sempre crescente il suo messaggio di servizio al Vangelo e alla Chiesa alle nuove tecnologie di comunicazione".

In che cosa consistono queste tecnologie? Si tratta delle trasmissioni via internet e via satellite. Queste vengono riprese e diffuse da centinaia di radio cattoliche locali (200 solo in Italia). Il problema sorge per i programmi in lingua esperanto, che non vengono ritrasmessi dalle radio locali. La sola possibilità che ci rimane è quella di ricorrere a Internet da cui si possono ascoltare le trasmissioni anche in differita (podcast).

Attenzione: con le trasmissioni via internet si è in grado di contare esattamente il numero di ascolti. È quindi importante che chi di noi dispone di un collegamento internet si ponga regolarmente in ascolto, perché, non rischiamo di perdere anche le trasmissioni in esperanto di Radio Vaticana, come è già successo per altre emittenti. Il modo più semplice per collegarsi è dal sito dell'Ueci (<http://www.ueci.it>) e da lì, sul menù di sinistra cliccare sull'icona di "Radio Vaticana",



oppure, per le trasmissioni del passato, su "Radio-Arkivo".



AMUZE

Ĉiuj ajn rajtas kontribui sendante al ni siajn humoraĵojn, kondiĉe ke ili estu en Esperanto.



(el www.gioba.it - sendis Tiziana Fossati)

Miskompreno

Milana esperantisto gastigas en sia domo eksterlandan samideanon; sed la gasto restas tro longe kaj ŝajne ne intencas foriri. Pro tio la gastiganto diras al li:

- Ĉu vi ne sopiras al via edzino kaj al viaj infanoj?
- Dankon pro via afableco, morgaŭ mi telefonos al ili, ke ili venu ĉi tie.

Misdedukto

Iu stiras sian aŭtomobilon, zigzagante je ĉiu sekundo. Policisto haltigas lin kaj diras al li:

- Vi stiras ebria!
- Ha, bonŝance! Mi timis ke la stirilo rompiĝis...

Diferenco

- Kia estas la diferenco inter milanano kaj ĝenoano?
- Kiam milanano kalviĝas, li

aĉetas perukon, kaj kiam ĝenoano kalviĝas, li vendas la kombilon.

Borsagento

- Kia estas la sekreto de via sukceso?
- Mi ĉiam aĉetas akciojn de la pesimistoj kaj vendas ilin al la optimistoj.

Infana deklaro 1

- Panjo, ĉu vi memoras pri tiu nia amforo, kiu estis transdonata dum jarcentoj de generacio al generacio?
- Jes, kio okazis?
- Mia generacio rompis ĝin.

Infana deklaro 2

Avino revenas de frizisto kun haroj tonditaj "masklece".

- Kiel bela vi estas avinjo, vi plu ne ŝajnas maljuna sinjorino!

- Dankon! Nun kion mi ŝajnas al vi?

- Vi ŝajnas maljuna sinjoro.

Pakaĵo

Leterportisto sonorigas ĉe la pordo. Alfenestriĝas sinjorino, kiu demandas:

- Kio estas?
- Ĝi estas pakaĵo por sinjorino Maria Rossi.
- Ĉu ĝi estas peza?
- Ne, nur duon-kilogramon.
- De kie ĝi venas?
- El poŝtoŝejo de Romo.
- Kiu sendis ĝin?
- Sendis la Vatikana Librejo.
- Kion ĝi entenas?
- Mi ne scias; bonvolu veni por akcepti ĝin kaj subskribi la ricevateston.
- Mi bedaŭras, sed mi ne povas.
- Kial?
- Mi ne estas sinjorino Rossi, ŝi loĝas en la apuda domo.

Gratulojn

Sinjoro kun malĝoja mieno eniras oficejon de malgranda komunumo.

- Mi venis ĉi tien por aranĝi la entombigon de mia forpasinta edzino.
- Ĉu vi ne memoras, ke vi entombigis vian edzinon antaŭ du jaroj?
- Sed tiam estis mia unua edzino, nun mi venis por la dua.
- Gratulojn, mi ne sciis, ke vi denove edziĝis!